## FRANCIO KAJ POLLANDO

# INTERKULTURA KAJ INTERREGIONA RENDEVUO PER UNU KOMUNA LINGVO, ESPERANTO

Nia programo:

1. Komenco per pola danco "Polonez"
2. Prezento de suda regiono de Pollando - Malsupra Silezio (Dolny Śląsk) kun ĝia ĉefurbo Vroclavo kaj kun legendoj pri tiu regiono - Małgorzata Komarnicka / la unua parto
Fine Teresa Sybilak invitos post la programo al komuna degustado de polaj bongustaĵoj
3. „Tacy Sami", (Tiuj Samaj) konata popola vroclava muzikgrupo kantos popolajn kantojn,
4. Dancgrupo Gracje
5. Kantoj pri Vroclavo – Wojtek Ławnikowicz
6. Prezento de suda regiono de Pollando - Malsupra Silezio (Dolny Śląsk) kun ĝia ĉefurbo Vroclavo kaj kun legendoj pri tiu regiono - Małgorzata Komarnicka / la dua parto
Fine Bożena Zajączkowska invitos partopreni post la programo en laborsesio por fari aĵojn el uzitaj paperoj, boteloj ktp / ŝi disdonos donacojn…
7. „Tacy Sami", (Tiuj Samaj) konata popola vroclava muzikgrupo kantos popolajn kantojn,
8. Dancgrupo Gracje
9. Kantoj de Wojtek Ławnikowicz
10 Komuna kanto en la lingvo Esperanto
11. Dancgrupo Gracje

Nia grupo kalkulos 18 personoj (13 virinoj kaj 5 viroj).

PLENUMANTOJ:

- 1. „Tacy Sami", (Tiuj Samaj) konata popola vroclava muzikgrupo,
- 2. Małgorzata Komarnicka prezentos sudan regionon de Pollando - Malsupra Silezio (Dolny Śląsk) kun ĝia ĉefurbo Vroclavo kaj rakontos legendojn pri tiu regiono,
- 3. Bożena Zajączkowska prezentos aĵojn, kiujn ŝi faras el uzitaj gazetoj, plastaj boteloj kaj eĉ juvelaĵoj el plantoj. ŝi ankaŭ gvidos laborsesiojn „Reciklingu eluzitajn materialojn",
- 4. Teresa Sybilak prezentos regionan kuirarton,
- 5. „Gracje", dancgrupo de esperantistinoj-pliaĝulinoj-kuraĝigistinoj prezentos proprajn dancojn kaj popolan dancon kaj gvidos integracian dancon…
- 6. Wojcieĥ Ławnikowicz, tenoro, kantanta Esperante kaj pole.




- 1.„Tacy Sami, (Tiuj Samaj) konata popola vroclava muzikgrupo, ekestis maje en la jaro 2007. Ili kantas melodiajn kaj popolajn kantojn kaj ludas trumpeton, fluton, akordionon, tamburon kaj gitaron. Ili gajnis multajn premiojn.

- 2. Małgorzata Komarnicka – prezento de la regiono Malsupra Silezio kaj ĉefurbo Vroclavo (historio, kutimoj, legendoj…)



**Małgorzata Komarnicka** laŭ la instruiteco ŝi estas interlingvisto kaj filozofo kaj laŭinkline ŝi estas esperantistino. ŝi ankaŭ estas ĵurnalistino, tradukistino kaj instruistino de la lingvo Esperanto. ŝi estas membro de la membro de La Scienca Societo pri Organizado kaj Direktado en Varsovio, adiunkto de AIS-San Marino. ŝi estas la aŭtorino de multaj artikoloj en Esperantaj revuoj ( daŭra kunlaboro kun "Juna Amiko", "Kresko" kaj "Pola Esperantisto") kaj ininciatinto de multaj kulturaj eventoj, sed antaŭ ĉio de eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj Internacia Simpozio en Vroclavo. ŝi estas la prezidantino de eŭropa Centro de Interkultura Edukado. www.ecem.com.pl

- 3. Bożena Zajączkowska prezentos aĵojn, kiujn ŝi faras el uzitaj gazetoj, plastaj boteloj kaj eĉ juvelaĵoj el plantoj. ŝi ankaŭ gvidos laborsesiojn „Reciklingu eluzitajn materialojn",



**Bożena Zajączkowska** amas naturon, kanton de birdoj, ŝatas legi librojn kaj okupiĝi pri diversaj manlaboroj kaj ĉiam pozitive rigardas mondon. ŝi preparas el eluzita papero belajn kaj elegantajn galanteriojn, korbojn, juvelaĵojn ktp. ŝi ankaŭ donas « novan vivon » al plastaj boteloj kaj scipovas prepari belajn juvelaĵoj el plantoj. ŝi kreas « liściaki » t.e. bildojn el sekigitaj elementoj de plantoj.

- 4. Teresa Sybilak prezentos regionan kuirarton,

**Teresa Sybilak** emerita oficistino, E-instruistino, gvidantino de ekskursoj kaj perfekta kuiristino. ŝi pozitive rigardas mondon kaj donacas al ĉiuj rideton. ŝi estas membro de la koruso „O' Kropy", kiu kantas E-kantojn.

- 5. „Gracje", dancgrupo de esperantistinoj-pliaĝulinoj-kuraĝigistinoj prezentos proprajn dancojn kaj popolan dancon kaj gvidos integracian dancon…

**Gracje** estas dancgrupo de esperantistinoj-pliaĝulinoj-kuraĝigistinoj. La grupo ekestis en 2016 kaj jam gajnis multajn premiojn. La grupo dancas siajn proprajn dancaranĝojn kaj foje popolajn dancojn.



- 6. Wojcieĉ Ławnikowicz, tenoro, kantanta Esperante kaj pole



**Wojcieĉ Ławnikowicz**, blinda tenoro, abituriento de vroclava Muzika Akademio. Profesie li estas instruisto kaj solgitaristo, kun plezuro li okupiĝas pri komponado. Precipan arton li elvolvis en aktorkanto. ŝatate li kantas seriozan literaturon. Li kantas ankaŭ en preĝejoj.
Lia aparta pasio estas Esperantaj kantoj, kiujn li bonege plenumas.

.